


# LA VERDA LUPEO FENĪKSO




N-ro 38 | 1977/3 Augusto | Oka jaro

## Informilo de la unuiĝintaj ELF – AREK – Kluboj

ELF: Esperanto Ligo Filatelista
AREK: Amika Rondo de Esperantaĵ – Kolektantoj




Jen la dum jardekoj nekonata poŝta E-stampo. Legu pli pri ĝi kaj pri aliaj filatelaj eldonaĵoj de tiu ĉi kongreso sur la tria paĝo de nia informilo.

## Afranku filatele!

Kvankam ni ĉiuj estas filatelistoj, tre multaj el niaj membroj ne atentas la filatelajn regulojn. Tion pruvas multaj de mi ricevitaj pk. kaj kov. de niaj amikoj. Alvenas kov. kun pm el normala serio, kun rulstampe fuŝitaj pm, kun difektitaj pm kaj kun tute ne legeblaj stampoj. Tio ĉi ne plezurigas filateliston. Tial jen kelkaj konsiloj, kiujn oni devus atenti dum poŝta ekspedo:

1. Uzu memorigajn pm, se eble kompletserie, se la serio tro ampleksa uzu la ceterajn por la sekvontaj kovertoj.

2. La pm trovu sian lokon pli al la mezo de la kov., kie ĝi ne povas survoje difektiĝi.

3. Enmanigu vian kov. al poŝtisto en giĉeto por apliki puran kaj bone legeblan stampon.

4. Por E-stampoj elektu pm egalan al la temo, do pri kgr. urbo au simile. Se ne havebla, tiam gluu plej malgrandformatan pm, por ke stampteksto ne malaperu en la pm.


5. Elektu memorigan kov. au pk., sed ne tiujn litotukajn kovertojn, kiuj ne estas uzeblaj por fila-ekspozaĵo.

6. Por via plej bona amik(in)o, kiu povas esti ankau vi mem afranku k ekspedu rekomendite k eksprese. El tio rezultiĝas fila-juvelo! Ne forĵetu la poŝtan kvitancon kun tiu E-stampo!

7. La afranko respondu almenau al minimuma poŝta tarifo, nur tiel ĝi respondas al FIPCO-reguloj kiuj validas por int. fila-ekspozicioj.

Obeu kaj vi faras ĝojon al vi mem kaj al via amiko!

*Rudolf Burmeister*







## Nova glumarko

Pri la eventoplena jaro 1917 kaj la okazintaĵoj en la tiama Sankta Piterburgo memorigas tiu ĉi esperantlingva propaganda glumarko.

En la sama urbo okazis 1926 la 6a kongreso de SAT. Tiu ĉi kongreso alportis al la Esperanto filatelio i.a. 2 memorigajn poŝtmarkojn kaj esperantlingvan memorigan poŝtan stampon en verda koloro. Tiu stampo hodiau estas tiom rara ke eĉ sovetaj katalogistoj ĝis 1966 ne sciis pri ĝia ekzisto kaj nur suplemente povis informi pri gi. La poŝtmarkoj memore al la kongreso portis en si sekreton, ĉar en la ovalo troviĝis la slogano de la tutmonda proletaro per morsaj signoj:

PROLETAROJ ĈIULANDAJ UNUIĜU!

Al E-filatelistoj same memorinda kaj apenau konata ke dum la tuta dauro de la kongreso en la kongresejo funkciis speciala poŝta giĉeto, kie deĵoris tri Esperanton parolantaj poŝtistoj. Kaj al kiu ĝis nun estis konata, ke eĉ esperantlingvan telegramformularon oni havis?

En la malferma tago radio Leningrado originale de 19a ĝis 22a horo sendis inauguran kunvenon kaj dum la dauro de la kongreso "Leningradskaja Pravda" havis apartan esperantlingvan paĝon.

Fonto: "Wissenswertes für die Arbeiterschaft"
Eldonita 1926 de A E B, Leipzig




## Novaj poŝtaj E-stampoj

**Grenoble**

En tiu ĉi franca urbo okazis ĉi-jare la nacia kongreso de la francaj Esperantistoj. La poŝta oficejo GRENOBLE CENTRE DE TRI uzis de 1.3.77 ĝis 31.5.77 maŝinstampon kun la teksto:

ESPERANTO CONGRES GRENOBLE: 27–31 MAI 1977

Samkiel Perpignan 1963 ankaŭ tiu ĉi foje aperas kun "kapopieda" (kapstara) datstampo.

**Paderborn**

Okaze de la "EUROPA ESPERANTO KONGRESO", kiu okazis fine de la monato majo, la Federacia Poŝto dum la kongresaj tagoj uzis memorigan poŝtan stampilon, kiu prezentas supre cititan tekston kun bildo de domo.

**Ohrid**

En Jugoslavio aperis 23.4.77 en makedona OHRID nova poŝta E-stampo okaze de la 20-jara jubileo de Fervojista E-societo Skopje. La teksto en cirillitera makedona lingvo:

20 GOD NA ESPERANTSKOTO DRUSTVO "JUŽEN ŽELEZNIĈAR

(Pro limigita kvanto (??) nur 1 ekzemplero sendata kontraŭ 2 IRK de s-ro Gjivoje, pf 5025, YU-41 040 Zagreb-Dubrava).

## La bela vesto de nia informilo

Ek de 1977 nia informilo surhavas belan kaj luksan veston. Tio tute ne estas merito de redaktoro, sed de sinjoro Paulsson kun sia kolektivo. Nome de la tuta membraro mi ĉi-loke elkore gratulas al nia amiko Paulsson kaj peras al li, al li filino, kiu retajpas mian manuskripton, kaj al lia bofilo, kiu multobligas (presas) nian informilon, nian elkoran dankon.

Ni esperas, ke ankorau longe ni povas porti tiun belan robon.

## Publika danko

Pro ricevitaj materialoj kaj informoj mi dankas al s-roj Wluka, Gimelli, Heimlich, Gjivoje, Tremon, Horak, Kuijpers, Gil Pallares, Dalet kaj Prodanescu.

*Rudolf Burmeister*


## Jean Amouroux pri FARMAN:


"Ne Farman sed Archdeacon verkis tiun libron, kies antauparolon tamen verkis Farman.

En 1908 Archeacon estis unu el la kunaranĝantoj de la unua unukilometra flugo en ISSY LES MOULINEAUX.

Mi posedas tre interesan fotokarton de la koncerna evento. En 1968 en ISSY LES MOULINEAUX ilustrita mekanika poŝtstampo memorigis la eventon."

Sinjoro Amouroux kunsendis tre interesan fotokopion pri tiu unika filatelaĵo, eble nia amiko Paulsson povas ĝin reprodukti en nian informilon.



## Stampo NE 14 en du variaĵoj

La memorigan stampon pri la 48a SAT-kongreso en HAAG 1975 akompanas du diversaj datstampiloj, tion mi eltrovis komparante miajn duoblaĵojn. Kiel katalogisto mi nun iom hezitas ĉu en katalogo mencii tion au ne, ĉar jam la stampo de la 48a UK en Sofio donas tiajn problemojn, foje aperas datstampo de Sofia, foje de Sofia C kaj plej ofte de Sofia F.

Ni kolektas ja la memorigajn stampojn kaj ne la datstampojn. Malgraû miaj skrupuloj jen la priskribo:

NE 14–1 ..... "78" en ds (datstampo)
NE 14–2 ..... "49" en ds

14–1: havas sube la ciferon 78, krome en ĝia supra segmento pozicias litero "b". Indiko pri la monato en dato arabcifere: 7

14–2: havas sube la ciferon 49, supre mankas la b-litero kaj la monatindiko romane: VII

## Afrankstampo "EVOLUON"

Nia membro J. Kuijpers klarigas pri ĝi:

"Rilate la frankotipon "Evoluon", pri kiu aludas sinjoro Werner Simon, mi sciigas al vi, ke tiu nomo estas elpensaĵo de iu nederlanda eksperto kaj nenion komunan havas kun nia internacia lingvo. EVOLUON estas speco de muzeo, de ekspozicio. La iniciatintoj intencis bildigi la homon en rilato kun la tekniko kaj la teknikon en rilato kun la homo. Ne nur en la nuntempo sed ankau en la jaro 1891, kiam la mondo troviĝis sur la sojlo de la giganta evoluo de la elektrotekniko.

### Nova varbstampo en Belgio

Kiel ni eksciis, en Belgio oni uzas novan varbstampon. Pro manko de detaloj skevontnumere ni ĝin pri traktos.






Membrolisto (15.5.77)

Mario Amadei
Via Solferino 15
I-40124 BOLOGNA
pm sta

Jean Amouroux
1 rue de Sorede
F-66000 Perpignan
pm sta

Dolfa Bartošik
Frani Sramka 31
CS-15000 Praha 5
pm sta tut glm ins

Christian Bechtoldt
Fichtenweg 14
D-643 Bad Hersfeld
pm sta

Stanislao Biesiada
P O Box 599
PL-42217 Czestochowa 17
pm sta tut ins med mon

Justo Boberg
Bastuhagsvägen 20
S-12242 Enskede
pm sta

Rudolf Burmeister
30-95-39, W Wolff Str 1
DDR-90 Karl-Marx-Stadt
pm sta tut ins

Jean Dalet
2 rue Sadi Carnot
F-92600 Asnieres
pm sta polusaj sta de SU

Bep Demmendaal
Ooltgenspaatweg 13 d
NL-3086 NK Rotterdam
pm glm

Conrad Fisher
R F D 6 (Shaws)
Meadville, Pa. 16335 USA
pm sta

Germano Gimelli
Via Donato Creti 61
I-40128 BOLOGNA
pm sta glm

Dick Goslinga
v.L. Stirumplein 20-1
NL Amsterdam
sta

Werner Heimlich
Fröbelstr. 4
D-304 Soltau
pm sta

Richard Hirsch
Lambertstr. 12
D-6430 Bad Hersfeld
pm sta

Odon Horak
Pšenik 7/1
CS-63900 Brno 39
pm sta tut glm

A.C. Huigen
Vierheemskinderenstr. 43
NL-1015 Amsterdam
pm sta glm

Feodor Jelenc
97 rue A. Fredin
F-86100 Chatellerault
pm

Kurt Lindström
Jämtlandsgatan 152
S-16220 Vällingby
pm sta glm mon

Gizella Köszegfalvi
Makarenko 1
H-6800 Hodmezövasarhely
pm glm

J. Kuijpers
Lombardkade 85-b-1
NL-3011 ZG Rotterdam
sta

Emilio Folgado Lopez
Av. Montano 15 bajo dcha
Badajoz HISPANIO
pm sta glm

Paul Mimlitsch
69 Blanchard Road
Marlton 0853 N.J. USA
pm sta

Haruja Maekaua
50-304 Edagawa-cho
Nishinomiya 663 JAPAN
pm sta pk UTK

Evaristo Gil Pallares
Apartado 875
Barcelona HISPANIO
sta pri multaj temoj

Ivar Paulsson
Algatan 3 III
S-17133 Solna
pm

Dro Rosetel Prodanescu
CP 5817
R-75500 Bucuresti 61
pm sta pk ins (pk pri katoj

Jack Andre Rosseau
64 Avenue Jean Moulin
F-75014 Paris
pm, sta

Ivan Peev
Rozova Dolina 9
Cirpan BULGARIO
pm sta

Tomasz Sobiech
ul. Prosta 4-5
PL-21500 Biala Podlaska
pm sta

Anton Straif
Siedlerstr. 14
A-4300 St. Valentin
pm sta

Anna-Greta Strönne
Amiralsgatan 36
S-21155 Malmö
pm sta fosilioj

Pál Toth
Molnar u 22 II e 7
H-1056 Budapest
pm sta tut glm

Vladimir Vana
Revoluční 54
CS-31202 Plzen
pm sta tut


S-ino Jeannine Vincent
26 bis rue de Milngavle
F-49 150 BAUGÉ
pm

Bohdan Wasilewski
ul. Kmicica 3
PL-05800 Pruszkow-Ost.
pm sta glm

Vilmos Radnai
PO Box 40
Dunaharaszti H-2331
sta glm koloraj diapozitivoj



HU 29



HU 30



HU 31




HU 33



HU 39



HU 36



HU 40



HU 41




HU 45



HU 48



HU 49



HU 51



HU 52



HU 53






































ESPERANTO
64e CONGRES NATIONAL
NANTES-PAQUES 72

CONGRES NATIONAL ESPERANTO
ST ETIENNE
30 MARS-2 AVRIL

CONGRES ESPERANTO
LA GRANDE MOTTE
PAQUES 1976

Aldono por via sta-katalogo

| | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| GFR 29 | Paderborn 1 | 1977 | 28.5 | Europa E-kgr | | |
| GRE 3 | Ateno | 1976 | 2.8 | 61a UK | ø: | 35 |
| IT 25 | Roma Aurelio | 1975 | 12.7 | 36a IKUE-kgr | | 35 |
| IT 26 | Massa C. P. | 1976 | 19/20.9 | 47a nacia E-kgr | | 32 |
| FRA 43 | Grenoble | 1977 | 1.3-31.5 | nacia E-kgr | | ms |
| JU 25 | Ohrid | 1977 | 23.4 | 20 jároj de E-fervojista societo | | |
| RSM 1 | San Marino | 1976 | 24.7 | 10a ILEI-konf. | | 34 |

Suplemento al bildparto
de la sta-katalogo 1970

1a parto




CS 16




CS 17




CS 18




CS 19




DA 8




FI 5





BRA 26




AR 4




RSM 1




BRI 12




AU 19




SVI 8

A. Wester v d Veen
Saenredamstraat 46
NL-1400 Zaandam
pm sta

Prof. Dr. W. Wenclewski
Lubumbashi ZAIRE
BP 1825
pm sta

Richard Wluka
Bremerstr. 8
D-3000 Hannover 21
ĉiujn E-aĵojn

L. J. Wulfers
Lindanusstr. 16
NL Nijmegen
pm sta glm

Klarigo de mallongigoj:

pm= poŝtmarkoj
sta poŝtaj stampoj
tut poŝtaj tutaĵoj
ins insignoj
mon moneroj
glm glumarkoj
med medaloj

ms maŝinstampo
ds datstampo
sms senfina maŝinstampo
UTK Unuataga koverto
ve verda
ru ruĝa
vi viola
ni nigra

Noto pri la membrolisto:

En ĝi trovis lokon nur tiuj, kiuj ĝis 15an de majo 1977 pagis sian kotizon. Ni esperas, ke ankoraŭ kelkaj pagos siajn kotizojn, per suplemento en nia informilo 1977/4 ni notos tiujn poste.
Se vi rimarkas erarojn en viaj adresoj, bv. sciigi tiujn al la redaktoro.

## "Poŝto de Esperantujo"

El Italio atingis la redaktoron bombonkoloraj dentumitaj glumarkoj kun la jena enhavo: Portreto de L.L. Zamenhof kun la teksto

ESPERANTUJÖ E-POŜTO 1 STELO L.L. ZAMENHOF

La glumarkoj estas presitaj en folioj de po 30 pecoj.

La markojn akompanas stampo (nepoŝta!) kun la teksto ESPERANTUJO KAVALKASELLE (VR) ITALIO kaj havas en si daton.

Kaj la markoj kaj la stampo estas haveblaj pere de: Giogio Vandelli, I-37010 Cavalcaselle.

Prezo de 1 marko: 50 Liroj, tuta folio kun 30 markoj kostas mil Liroj italaj.

Tiuj stampo kaj marko havas jam siajn fratojn. Temas pri la produktoj de la "Insulo de la rozoj". Sed ankau ekzistas al maŝinpoŝta simila stampo pri reklamio por teksaĵoj. Iam antau jaroj iu el miaj francaj amikoj klarigis al mi la historion de tiu teksaĵstampo (temas pri privata nepoŝta stampo), sed bedaurinde siatempe ne bone notis tiujn informojn. Nia membro Vana posedas tiun stampon.

Denove mi volas substreki, ke oni kompreneble rajtas kolekti tiajn objektojn, sed en filatela ekspozaĵo ili ne havas lokon!



## E-filatela renkontiĝo en San Marino

Sinjoro Germano Gimelli informis, ke "dum la monatoj AUG-SEPT okazos en San Marino filatelaj manifestacioj por celebri la centjaran datrevenon de la unua pm en tiu Sendependa Respubliko. D-ro De Salvo obtenis de la Direktoro de la Filatela Oficejo de San Marino la salonon por renkontiĝo de la Esperantistoj-Filatelistoj, en la kadro de tiu grava manifestacio.

Tiu renkontiĝo okazos la 1-an de septembro 1977 je la 15a horo. Tio estas tre grava evento. Oni petas: disvastigi la noticon de la renkontiĝo kaj skribi al la Organiza Komitato (ĉe UFFICIO FILATELICO della Republicca di San Marino) petante la programon de la manifestacioj, substrekante ke rilatas esperantistojn."

La klubo dankas pro la ricevitaj informoj al nia amiko Gimelli kaj volonte aperigis tiun interesan sciigon. Ni deziras al la organizantoj de la E-filatela renkontiĝo plenan sukceson kun multaj partoprenantoj!

## Ankoraufoje pri Henri Farman

. . . mi volas korekti la informon aperintan sur paĝo 7 en 1977/2 kun la subskribo de FABA (el Zpravodaj 29/76). Hazarde kuŝas sur mia skribotablo la prialudita libro "Pourquoi je suis . . ." kiun mi legis antau kelkaj tagoj. Verkis ĝin ne H. Farman, sed Ernest Archdeacon, pioniro de la flugveturado en Franclando. Henri Farman, lia amiko kaj gajninto de la pokalo Deutsch-Archdeacon, aljuĝita al la aviadisto, kiu unue sukcesis flugi unu kilometron en fermita cirkvito, verkis nur la antauparolon de tiu libro. En tiu okpaĝa teksto li klarigas, kiel li fariĝis adepto de Esperanto, pledas por la I L, sed nenie li indikas, ke li "larĝskale propagandis ĝin per siaj propagandaj flugoj".

Li eĉ konfesis (p. 11), ke li ne flue parolas Esperanton, sed nur legas kaj skribas ĝin "sufiĉe facile".

Mi estus tre dankema al vi se vi bonvolus aperigi tiun korekton en la sekvonta informilo.

*Jeannine Vincent*

## E-filatela aktivado en Italio

Komence de decembro 1976 okazis en Italio du ekspozicioj, nome la 7a Interdepartementa Fervojista Filatela Ekspozicio memore al la sepdekjara datreveno de la traboro de la Simplontunelo en Firence, kaj la Tria Filatela Ekspozicio memore al la centjaro de la Internacia Kompanio de Litvagonoj en Bologna.

En ambau ekspozicioj partoprenis sinjoro Gimelli kun sia E-kolekto kaj gajnis pokalon kaj alian premion.

Ankau okazis informa ekspozicio pri Esperanto en la ekspo-salono de la fervoja stacidomo en Venecio ek de 19a decembro. En ĝi trovis lokon i.a. ankau E-filatela kolekto. La ekspozaĵoj vekis grandan interson inter la vojaĝantoj.

(El raportoj en informilo de IFEA el la plumo de s-ro Spartaco Tarlindano).

## Int. renkontiĝo de motiv-filatelistoj

Nia membro kaj vicprezidanto sinjoro W. Heimlich, informis ke supre nomita renkontiĝo okazos 24 k 25 SEPT 1977 en Winterthur. Inter alie okazos jarkunvenoj de la motivgrupoj fervojo, ŝipoj kaj automobiloj.

El la ampleksa programo mi volus mencii la prelegon pri: Tutaĵoj kaj UTK en la motiva kolekto. Vojaĝemuloj bv. sin turni al Werner Heimlich, D-304 Soltau, Fröbelstr. 4.

## UK 1978 Varna

Ni povas esperi, ke okaze de tiu UK nia kolekto kreskos je pliaj pm k stampoj. Mi eksciis, ke la LKK jam petis de poŝta ministerio tiujn filatelajn memoraĵojn. Ni premu ĉiuj niajn dikfingrojn por ke la bulgaroj sukcesu!

## E-filatela ekspozicio en UK 1978?

Hazarde sub miajn manojn venis numero de la gazeto "bulgara esperantisto", kiu enhavis raporton pri la nacia bulgara E-kongreso 1976 en Ruse. Inter alie iu altranga filatela funkciulo proponis al la nacia kongreso organizi en la kadro de la UK 1978 grandan internacian filatelan ekspozicion pri Esperanto. Tre bona afero, ke neesperantisto tion proponis al la esperantistoj. Sed bedaurinde ĝis hodiau min ne atingis iuj pliaj informoj aŭ alvokoj pri partopreno en tia ekspo. Mi timas, ke la tempo nun jam estas tro malfrue por aranĝi kvalitan filatelan ekspozicion. La propono venis ĝustatempe, ĝustaloke kaj de la ĝusta homo. La esperantistoj ŝajne neglektis tiun bonegan eblecon. Eble niaj membroj, mia kara amiko Ivan Peev, au la prezidanto de la bulgaraj E-kolektantoj Leviĉarof foje povus sendi al ni informojn pri la afero?

## Stampo Krakow 1912

Laû la sube citita artikolo el la iama "LA INTERLIGILO DE L' P.T.T." (numero 2/3 156/157 FEB/MAR 1937) ne plu estas dubo pri la poŝta autentikeco kaj dank'al la donitaj informoj iu povus facile surloke kontroli en Vieno.

"La unua p.-stampilo kun esp.teksto estis uzata okaze de VIII-a Universala esp. kongreso en jaro 1912 en Krakovo. Ĝin iniciatas s-ro D-ro Leon Rosenstock, ĝenerala sekretario de la lokal kongresa komitato. (Li ankorau nun loĝas en Krakovo kiel advokato kaj kunlaboranto por POLA ESPERANTISTO.) Li sendis pri la stampilo petskribon al Poŝta ministerio en Wien (Krakow tiam apartenis al Aûstrio) kaj dank'al subteno de Vienaj samideanoj, la ministro permesis uzadon de speciala kongresa stampilo. Tamen la elspezojn por la stampilo devis pagi la kongresa kaso. La stampilon projektis la inicianto mem kaj laû tio ĝi estis farita en la stampilfarejo de s-ro Treback en Krakovo. Diametro de la stampilo estis 28 mm. Nun la stampilo estas en Wien, ĉar la ministro postulis, ke post la kongreso la stampilo estu sendata al la poŝta muzeo en Wien . . .

Due E-stampilo estis uzata en Bern . . . ĝis designis D-ro Ed. Spielmann . . .

Tiu ĉi artikolo estas subskribita de "J. VAHTRA".

Informis kaj sendis fotokopion de la artikolo nian franca membro s-ro Amouroux, pro kio ni kore dankas al li.




---

**Anonco**
Kolektanto proponas la stampon de la 8a SAT-Kgr (1928 en Göteborg) kontraû 200 skr. Interesulo bv. kontakti kun s-ro Paulsson.

†

8an de aprilo 1977 pro la sekvoj de akcidento forpasis en sia 93a vivojaro nia longjara kaj fidela membro kaj amiko, sinjoro

**Franz Mayer**
Frankfurt/Main – FRG

Ni sincere kondolencas al la familio, lia nomo restas en nia memoro.

## Donacoj

Sinjoro Werner Heimlich disponigis al la kaso de nia klubo el la enspezoj de la sta-banko sumon de 150 svedaj kronoj.

Krome li donacis al nia klubo 50 nederlandajn guldenojn.

Niaj membroj Mimlitsch kaj Wluka sendis donace monon al nia kaso.

Al ĉiuj ni esprimu nian dankon. La kontribuitaj donacoj grave helpis, povi daŭrigi nian kluban laboron.

*I.P.*

## El "fundamento" de ELF–AREK

- Inter la esperantistaro la klubo kunigas E-filatelistojn kaj Esperantaĵkolektantojn
- Unuarange la klubo celas kolektadon de e-aĵoj k e-filatelaĵoj
- Senescepte ĉiu membro devas pagi kotizon
- La kluba informilo estas grava helpilo por ĉiuj membroj. Tial ĉiuj laŭpove informas pri novaĵoj en siaj landoj pere de la informilo.

## Redaktoraj vortoj

Pli kaj pli la kuniĝo de ELF kaj AREK montras siajn fruktojn kaj la kunlaboro inter redaktoro kaj membroj pliboniĝas. Finante la redaktadon de tiu ĉi numero mi povis konstati, ke ni jam denove estas 40 membroj kaj sendube ni estos pli, ĉar kelkaj el niaj geamikoj tutsimple forgesis pagi.

Ankoraŭ nia informilo havas iujn mankojn, ni klopodas, eviti tiujn estonte, sed ni ankaŭ scias, ke eĉ plej gravaj gazetoj kun kelkcent da profesiaj kunlaborantoj havas siajn preserarojn k.a. mankojn. Ni ja estas laikoj (mi ekz. ĉarpentisto) kaj nur povas klopodi, kiel eble plej bone laŭ niaj kapabloj aranĝi nian informilon.

Ankaŭ mi intencis, ekspedi numeron 1977/2 jam en aprilo, ĉar preta ĝi estis jam en marto! Sed ne ĉiam ĉio iras glate, intervenas malsanoj ktp. Tial nur fine de majo mi ĝin povis ekspedi el Berlino.

Anstataŭ tio ni eble sukcesos, ekspedi tiun ĉi numeron jam komence de julio. Hodiaŭ (12.6.77) mi sendas la tajposkripton al sinjoro Paulsson por presado, li kun sia stabo pretigas nian informilon. Poste li resendos ĝin al GDR, de kie mi ĝin ekspedas pro niaj tre malaltaj poŝtaj tarifoj.

Mi esperas, ke tiu ĉi numero denove kontentigas vin, kaj, ke ankaŭ estonte vi sendos kontribuaĵojn por nia informilo.


*Rudolf Burmeister*


**Prezidanto de la ELF/AREK-Klubo:**
Ivar Paulsson, S-171 33 Solna, Algatan 3

| | |
|---|---|
| Poŝtkonto: | 51 57 85-4 – I. Paulsson, Solna |
| Telefona numero: | 46 827 56 49 (internacia) |
| | 08-27 56 49 (nacia) |
| Jarkotizo: | 10 IRK au egalvaloro |
| | (Bv. sendi ĝin al s-ro Paulsson) |

**Redaktoro de la kluba informilo:**
Rudolf Burmeister, DDR 90 Karl-Marx-Stadt
p.k. 30-95-39, Wilhelm Wolff Str. 1
(Bv. sendi al li ĉion por la informilo)

---




REYKJAVÍK 2.-5.8. 1977

